Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

**La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio**

# La Kolombo de Paco

**21-a de julio 2021, numero 11**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova


## Oratora Konkurso de UEA

Merkrede la 21-an de julio okazis la Oratora Konkurso de UEA. Ĝi celas "evoluigi la Esperantlingvan parolarton inter la junularo". Ĉiu Konkursanto devis elekti unu el la jenaj du temoj:

1. Sen paco kaj konfido la mondo….
2. Ne nur paco kaj konfido, sed….

Tri oratoroj partoprenis. Ĉiu traktis la temon verve dum 10-minuta parolado. Poste la ĉeestanta publiko estis invitita doni siajn komentojn kaj sugestojn. La komisiono juĝis la paroladojn "el vidpunktoj enhava, lingva, stila, kaj laŭ la ĝenerala sinteno de la kandidato kiel oratoro". Jen la decidoj:

1-a premio al Snehaja Venkatesh (Barato)




2-a premio al Manuela Burghelea (Brazilo)
3-a premio al Ariadna García Gutiérrez (Kubo)



La juĝkomisiono aljuĝis tri premiojn: unua premio estas senpaga aliĝo al la Universala Kongreso en Montrealo 2022 laŭ kategorio A en la frua aliĝperiodo aŭ 100 eŭroj; dua premio, 75 eŭroj; kaj tria, 50 eŭroj (ĉiuj monsumoj liverotaj kiel aĉetkuponoj por la Libroservo de UEA).


**Gratulojn al la premiitoj!**

*Komisiono pri la Oratora Konkurso*
*Giridhar Rao, Marc Giraud, Leandro Abrahão*

## Aliĝu al la Internacia Junulara Kongreso

Se vi ankoraŭ ne aliĝis al ĉijara IJK. Rapidiĝu! La IJK komenciĝos venontsemajne, nepre ne forgesu aliĝi!

Ĉikaze la IJK okazos denove en tute alia formo. Ĝi estos reta sed en platformo kiu ege alproksimiĝas la sperton al fizika renkontiĝo. Aldone, aliĝo estas tute senpaga por Individuaj Membroj kaj patronoj de TEJO. Vi estas unu el ili, do ekprofitu el ĝi kaj tuj aliĝu! https://mallonge.net/fy




Kun la temo *Vojoj al Estonteco*, IJK estas ora oportuno por ekkoni novajn Esperantistojn el la tuta mondo kaj renkonti malnovajn amikojn. Ne maltrafu tiun oportunon! Multo okazos dum la IJK, en ĝi vi povos danci kaj kanti en amuzaj koncertoj, partopreni interesajn prelegojn, esplori mondon kreitan nur por la IJK, ludi ludojn diversajn… Vi eĉ povos spekti teatraĵon verkitan nur por ĉi tiu IJK!

Ek! Ne plu prokrastu kaj aliĝu kiel jam faris centoj de junaj Esperantistoj. Por tiu prezo, kial atendi? Ni atendas vin en la IJK!

Kion atendi: https://ijk2021.tejo.org/kion-atendi

# Kampanjo Hans Bakker de la Afrika Komisiono de UEA

**Celoj de la projekto:**

1. Krei Esperanto-klubojn en ĉiuj landoj de Afriko, kie ankoraŭ ne estas Esperanto-agado, kaj aktivigi esperantistojn tie, kie jam ili estas kun aparta atento al la delegitoj de UEA kaj junularaj delegitoj.

2. Partoprenigi afrikanojn, ĉefe membrojn de la Afrika Komisiono (AK), en diversaj virtualaj renkontiĝoj, por adaptiĝi al la nuna monda situacio.



**Praktikaj agadoj:**

1. Dividi Afrikon en regionojn kaj ĉiu membro de la Afrika Komisiono estu respondeca pri unu regiono.

2. Ĉiu membro de la Afrika Komisiono klopodos trovi kontaktojn en ĉiuj landoj de sia regiono kaj proponos perkorespondajn kursojn. Tio okazos per reta varbado, dissendo de informiloj aŭ alia varbmetodo.

3. Daŭra korespondado de la komisionanoj kun unuopaj aktivuloj kaj kluboj jam ekzistantaj por aktivigi ilin.

4. Raportado regule okazos tra la Afrika Bulteno, la revuo de UEA kaj la retejo de la Afrika Komisiono, kaj, kaze de problemoj, la Afrika Komisiono kaj kunlaborantoj klopodos trovi solvon.

5. La Afrika Komisiono sin devigas redakti agadplanon ĝis 2022 kaj vaste diskonigi ĝin.

**Bezono:** Unue, ni bezonos ĉirkaŭ 1 000 eŭrojn por 5 komputiloj de aktivaj membroj de la Afrika Komisiono. Ni pensas, ke eblas havi bone funkciantan komputilon en Afriko per 200 eŭroj, sed provizantoj de uzataj komputiloj estos kontaktitaj.

**Observoj:** Ĉi tiuj komputiloj iom urĝas, ĉar tiel la AK-anoj kapablos partopreni la Virtualan Kongreson kaj aliajn virtualajn Esperanto-kunvenojn en la sekvaj monatoj kaj plie spertiĝi.

Indas doni iom pli da mono por ankaŭ helpi pagi interretan krediton.

Ni supozas ke pliaj kluboj povus finance subteni almenaŭ parton au tutan komputilon. Se ni kolektos pli da mono ol necese nun, ni ĉiam povus uzi tion poste okaze de tio, ke ies komputilo difektiĝos, aŭ por doni al aktivuloj kiuj ne estas membroj de la Afrika Komisiono, sed de la konsilantaro de la Komisiono.

**Iniciatintoj:** Sabiyumva Jeremie: estrarano de UEA pri Afriko, Elisee Byelongo, Afrika Komisiono de UEA, Renato Corsetti, Komisiito de UEA pri Landa Agado, Heidi Goes, aktivulino pri Agado en Afriko.

**Pagmanieroj:**
uea.org/alighoj/donacoj/afriko kun la indiko "por la konto Afriko-komputiloj" aŭ rekta Paypal-ligilo:
paypal.com/donate?hosted_button_id=LMXLGAJ7746GC

*Gazetara Komuniko de UEA*

# SAT-Amikaro, kanto de Joel Muhire kun Puissance B Power

SAT-Amikaro estas kanto de Joel Muhire kun Puissance B Power omaĝe al la 100-jariĝo de SAT en 2021 kaj elsendita kadre de la 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto.

Vi povas spekti filmeton kun ĝi en la jutuba kanalo *UEAViva*:
https://www.youtube.com/watch?v=eELTm3H622c



La 2-a VK kalkulis je la saluto de SAT dum sia malfermo kaj enhavas du programerojn: prelegon de Miguel Fernández, "Neforgeseblaj kamaradoj en la centjariĝo de SAT", kaj debatrondon pri la historio kaj perspektivojn de la laborista Esperanto-movado:
https://vk.retevent.com/programo?s=SAT.

# Tago de Lernado

La ĉi-jara "Tago de Lernado" iĝis eble unu inter la plej longaj programeroj de la VK2.

Preskaŭ kvinhora programo kun eta paŭzeto kaptis atenton de kongresanoj, inter kiuj multaj ĉeestis la kompletan programon.

Post la bonvenigaj salutvortoj de la prezidanto de UEA Duncan Chaters kaj de la prezidantino de ILEI Mireille Grosjean, sekvis la unua bloko da prelegoj. Ili ĉefe estis ligitaj al la temo de la VK2.



Duncan Charters aliris la temon per la prelego "Paco kaj konfido en la mondo de edukado". Sekvis Mireille Grosjean kun la atentigo "Ne okazas lernado sen fido". Goro Christoph Kimura dum la prelego "Kio estas interlingva diverseco kaj kial ni bezonas ĝin?" donis plurajn ekzemplojn el la praktika vidpunkto, samkiel Martina Kvarantan Šmitran per la prelego "De aplaŭdo al konfido". Monika Molnar per la prelego "Konfido kaj memkonfido en la klasĉambro" montris kiel la lernantoj de la frua aĝo perceptas la menciitajn nociojn.

Dum la dua parto de la programo, oni donis atenton al la Esperanto-instruado. Por ĉi tiu okazo, Katalin Kováts aranĝis la enketilon "Per kio kion kaj kiel instrui?", kaj Dennis Keefe parolis pri bildoj en la instruado, kaj koncentriĝis al la adapto de la "Praktika bildvortaro" por reta uzo.

Ĉe la fino, la publiko havis eblecon aŭdi informojn de Vicente Manzano-Arrondo pri la iniciato "Esperanta universitato".

Laŭ la diskutoj kaj komentoj evidentiĝis, ke ĉiuj prelegoj akiris grandan intereson pro sia aktualeco kaj de la pritraktitaj demandoj, kaj laŭ la alirmaniero.

Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# Virtuala Ekskursa Tago: Jerusalemo, Pekino, Belfasto, Tuluzo, Rio de Janeiro kaj...Titaniko

Kiel dum la UK, merkredo estis la Ekskursa Tago. Diference de la UK, la ekskursoj estis ne nur apud la kongresurbo (kiu ĉi-jare devus esti Belfasto) sed tutmonde. Enkonduke la ekskursa kunordiganto Amri Wandel prezentis la diversajn ekskurslokojn sur mondmapo. Poste li ĉiĉeronis la virtualan ekskurson en Jerusalemo: de la Tomba Preĝejo ĝis la Lamenta Muro. La postaj ekskursoj estis al la Somera Palaco (aŭ la "Malpermesita Urbo") en Pekino, bicikle tra la franca insulo Re, la usona kolegio Principia (kiun gvidis la prezidanto de UEA Duncan Charters, kiu estas profesoro en tiu kolegio) kaj Esperanto-kluboj en Benelukso. Fine de la Tago TEJO prezentis virtualajn ekskursojn en Belfasto kaj Edinburgo (Petro Cleaves), Tuluzo, Belen kaj Rio de Janeiro (Manuela Burghelea). Poste Petro klarigis kiel partopreni la komputilan ludon, en la retligo https://mallonge.net/fx, dum kiu eblas viziti la virtualan Titanikon kaj spekti denove ĉiujn ekskursojn, organizitajn sub la projekto JuPo.

*(Ilustraĵojn vidu sur la sekva paĝo)*

# Memoro pri Antonio De Salvo



La 21-an de marto mortis Antonio De Salvo (08.06.1942–21.03.2021).

Dum pluraj jaroj li estis membro kaj aktivulo de IKUE, ankaŭ ĝia prezidanto, sed same li multon kontribuis al la itala, kaj tutmonda Esperanto-movado.

Ĝis la morto li prizorgis la tekstojn por la blogo, kie oni povas ĉiutage legi iun interesaĵon ĉefe el la kultura vivo.

Ni ne forgesu, ke en la jaro 2019 UEA donis al li la diplomon pri Elstara Arta Agado.

Se vi deziras dividi viajn memorojn pri Antonio, venu al la MiVF de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista – IKUE, vendredon, la 23-an de julio je la 18-a horo (UTC).

*Marija Belošević, prezidantino de IKUE*

# Virtualaj ekskursoj



Jerusalemo – de la Sankta Tombo
ĝis la Lamenta Muro



Pekino
Imperiestra Palaco




Bicikla ekskurso
en la insulo Ré (Francio)



Principia kolegio
Usono



Esperanto-kluboj
en Benelukso



Ekskurso per
la virtuala Titaniko

## Fondaĵo Canuto

Multaj arde deziras membriĝi en UEA, sed ne ĉiuj povas. Via donaco al Fondaĵo Canuto helpos nin teni la kontaktojn kun tiuj, kiuj suferas pro transpagaj baroj. Antaŭdankon pro via solidareco!